






FOKSO - NUKSO




IGNÁT HERRMANN:

FOKSO-NUKSO

MEMORINDA

INSTRUA KAJ AVERTA

RAKONTO



LAŬ LA TRIA ELDONO TRADUKIS KAJ ELDONIS
MORAVIAJ ESPERANTO PIONIROJ
OLOMOUC ĈSR.

552056



Tradukita
kun afabla permeso de la aŭtoro
laŭ la XVII-a volumo
de liaj kolektitaj
verkoj

*

Ĉiuj rajtoj rezervitaj
al la aŭtoro

*

821.162.3-344.5

*Ĉi tiun tradukon
ni dediĉas al nia plej diligenta pionirino
sinjorino*

JULIE ŠUPICHOVÁ

instruistino en Praha

*

Olomouc, Ĉeĥoslovakujo

Kristnasko 1932

MORAVIAJ ESPERANTO PIONIROJ

IGNÁT HERRMANN naskiĝis la 12an de aŭgusto 1854 en Chotěboř en Bohemio. Sian jun-aĝon li travivis en Hradec Králové, kie li frekventis ankaŭ kvar klasojn de la normala kaj unu klason de la reala lernejoj. Dekkvarjara li foriris al Praha por lerni la komercmetion. Li fariĝis advokata skribisto kaj venis en la eldonejon de Otto, redaktis gazeton „Poleček“, poste li transiris en la redakcion de „Národní Listy“, kie li fariĝis rakontisto en la dimanĉa aldono kaj redaktanto de la rubriko „El la juĝeja ĉambrego“. Tiam li kapablis jam pli kviete dediĉi sin al la verkado.

Herrmann estas humoristo, tamen lia humoro estas nek seka, nek kruda, ĝi estas traplektita de bonkoreco. Materialon al siaj figuroj li ĉerpas el la vivo de simplanimaj homoj en sia hejmo kaj en malnova Praha. Karikaturante modere iliajn ridindaĵojn li neniam malzorgas akcenti ankaŭ iliajn bonajn ecojn; tial fariĝis Herrmann ŝatata kaj tre legata kronikisto de prahaa pereanta metiistaro, kiu devas cedi sian lokon al industrio kaj komerco de la moderna Praha. Herrmann konas ĉiujn stratetojn kaj anguletojn de la malnova Praha kaj multnombraj liaj rakontoj estas trafaj kaj fidelaj gvidiloj tra nia ĉefurbo dum ĝia antaŭnelonga pasinteco.

Siajn verkojn publikigis Herrmann en literaturaj revuoj Květy, Světozor, Lumír kaj eldonadis ilin de tempo al tempo ankaŭ en kolektoj sub diversaj nomoj. Li fondis belan humoristan gazeton „Švanda Dudák“, kiun plejparte li ankaŭ mem plenigis per siaj verkoj. Lia plej grava verko estas „U snědného krámu“. (Ĉe la formanĝita buliko.) Multe ŝatata li fariĝis pro siaj verkoj „Otec Kondelík a ženich Vejvara“ (La patro Kondelík kaj la svaltato Vejvara), kaj „Vdavy Nanyňky Kulichovy“ (La edziĝo de Anjo Kulichová) kaj aliaj. Multaj liaj verkoj estas tradukitaj en fremdajn lingvojn; ankaŭ per filmoj ili estis reproduktitaj.

Estante longjara prezidanto de la verkista organizaĵo „Máj“ akiris Herrmann grandajn meritojn pri ĉi tiu memhelpa organizaĵo.

I.

Mi konfesas, ke ne estus necese ĝeni sinjoron majoron Votruba dum lia honeste meritita ripozo. Li preskaŭ preterglitas nur en la komenco de ĉi tiu — nepre vera — rakonto, poste li intertempe malaperos post kulisoj.

Sed kiel ajn mi meditu, tamen mi ne povas lasi sinjoron majoron Votruba neĝenata, ĉar lia partopreno en la afero „Fokso-Nukso“ estis sufiĉe grava. Krom tio ĉiu rakonto devas havi ian komencon kaj la eminentulo, kiu komisiis min per prilaboro de ĉi tiu materialo, diris al mi premante mian manon por adiaŭi min:

„Restu nur ĉe la vero, kara amiko. Mi certigas vin, ke ĝi sufiĉos al vi.“

Mi restas do ĉe la vero kaj ĉe la majoro Votruba.

Sinjoro majoro Votruba ĵus estis matenmanĝinta kaj lia mastrumantino Katy forportis la malplenan vazaron en la kuirejon. Tutajn dek jarojn priservis jam ĉi tiu virina oficirservisto sinjoron majoron. Ĉar la tagon, je kiu li estis laŭmerite pensiita, oni forprenis de la majoro lian fidelan oficirserviston, por ke li finservu en la kompanio, kaj kiu scias, kie li troviĝas nun — post tutaj

dek jaroj. Tamen menciinde estas, ke Katy, kiun sinjoro majoro rekrutigis por la resto de sia civila vivo, bonege akomodiĝis al la militistaj postuloj de sinjoro majoro — ja, pro kelka kialo ŝi estis eĉ pli konvena al li, ol lia iama fidela oficirservisto, Jirka Kramota. Ne estis neeble kaj preskaŭ oni povis rajte supozi, ke Katy dum sia jun'aĝo ricevis ian militistan fak'edukon. Efektive ne estas dubinde, ke kelka ŝia kamaradino tuj povus esti envicigita en kompanion, kaj ankoraŭ malpli dubinde estas, ke la tuta kompanio sincere ĝojus pri tia kompletigo.

Post nelonge revenis Katy en la ĉambron kaj transdonis al sia estro leteron, kiun ŝus alportis leterportisto.

La majoro prenis cigaron el la buŝo, surmetis nazumon, tralegis atente la adreson, turnis la koverton, denove li turnis ĝin kaj observis poŝtan stampon, poste li diris al si:

„Kia surprizo — el Polujo! Kiu do — — —?“

Li distranĉis la koverton, eltiris la leteron, disfaldis ĝin kaj scivole li serĉis la subskribon.

„Ĉe diablo — Goljaŝ! Kolonelo Goljaŝ! — Do tamen li vivas ankoraŭ! Kaj kion li volas?“

Post nelonge sciis la majoro, kion la kolonelo volas kaj kion li ne volas. Por ke ankoraŭ la legantoj eksciu tion, jen laŭvorta enhavo de la letero de sinjoro Goljaŝ:

„Kara, malnova kamarado!

Do ankoraŭ min ne plu turmentas la militservoj! De post la unua mi sidas en pensio kaj mi esperas, ke mi sidos en ĝi sufiĉe da jaroj. Memkompreneble, mi promenas ankoraŭ, sed sur ĉevalon mi ne grimpos plu. En nia aĝo oni ne havas superfluan da kruroj kaj, de post kiam tiuj kruroj apartenas sole al mi kaj al neniu alia, mi traktas ilin tre zorgeme. Ĉio estas bela, kara malnova kamarado, nur soleco premas min de tempo al tempo kaj tial mi eksopiris je estaĵo, kiu neprofiteme plidolĉigus mian solecon.“

„Mil tondroj!“ interrompis majoro Votruba la legadon. „Ĉu tiu maljuna fraŭlo eble volas edziĝi?“

„En la ĉi tiea regiono io simila ne estas havebla“, li daŭrigis la legadon, „kaj mi rememoras, ke, kiam mi militservis en Praha, hazarde mi venis en iun tre mallarĝan kaj precipe antaŭ pluvo homece tre malbonodorantan straton, kies nomon mi ne scias — kiu el ni rigardis ja tiam la nomojn de la stratoj! — sed ŝajnas al mi, ke tio estis ie proksime al Spálená-strato, kie oni vendis birdojn, kaviojn, kuniklojn, simiojn kaj ankoraŭ hundojn. Ĉu vi divenas jam, kion mi volas? Jes, kara malnova kamarado, ne koleru pri mi, iru en ĉi tiun butikon — vi certe scias pri ĝi — kaj aranĝu tie, ke oni sendu al mi prezaron, prospekton aŭ ion, laŭ kio mi povus elekti, je kio mi sopiras. Precipe mi dezirus havi sanan,

viglan, purrasan foksterieron. Ĉu vi komprenas? Neniun bestaĉon, grandan kiel bovido, neniun bernardan hundon, neniun anglan dogon! Ankaŭ neniun buldogon. Kaj se ili havas tie iun viglan foksterieron, iom bone edukitan — vi havas ja ankaŭ tiurilatajn spertojn! — ili sendu ĝin al mi. Jen! Tio estas mia unua zorgo. Cetere mi esperas, ke per nenio plu mi ĝenos vin. Sana vi estas, espereble. Mi ankaŭ, dankon al dio, krom malgrandaj malregulaĵoj okazantaj de tempo al tempo en la postaj regionoj. Sed kia helpo, ian difekton oni ĉiam gajnas dum soldata servo. Adiaŭ! Via malnova, fidela kamarado Goljať.

Majoro Votruba faldis la leteron, enŝovis ĝin en la koverton, leviĝis de la brakseĝo.

„Dankon al dio, ke li postulas nenion alian! Mi ektimis jam, ke mi elserĉu „vivkunulinon“ al li! Ekzistas ankaŭ tiaj frenezuloj, kiuj prokrastas tion ĝis la pensio. Kompreneble poste tio estas tiel nomata plikrudigita pensio. — Nu bone, al la kamarado Goljať oni povas helpi. — Katy!”

Katy aperis sur la sojlo.

„Jakon, ĉapelon, bastonon, gantojn!” — —

Kaj surmetante la vestojn la majoro grumblis:

„Do vidu! Li ankaŭ havas jam pensitan dekreton! Li opiniis ĉiam, ke li servos senfine. Jes, jes, kamarado, per ĉio oni satiĝas kaj la hemoroidan vejnon oni servogajnas pli eble ol general’pan-

talonojn. Kaj nun do mi establu hund’agentejon al mi . . .”

Li ŝmiris ankoraŭ siajn lipharojn per vakspomado, suprentordis ilin, donis al Katy kelkajn ordonojn kaj foriris el la domo. — — —

La tagmezo pasis, en manĝoĉambro de la majoro jam delonge tablo estis preparita por tagmanĝo, en la kuirejo eliĝis vaporo el potoj kaj kaseroloj sur la forno, Katy mem de tempo al tempo malfermadis la pordon aŭskultante en la direkto al la ŝtuparo, ĉu ŝia estro kaj ordonanto revenas jam. — Fine ekaŭdiĝis malsupre en la koridoro konataj paŝoj kaj Katy rapidis en la manĝoĉambron por verŝi supon sur teleron.

— — —

Hodiaŭ la majoro ne ekkuŝis tuj post la tagmanĝo. Manĝinte li eksidis ĉe la skribtablo, elserĉis sub la submetaĵo leterpaperon, por respondi al la malnova kunbatalinto, surmetis nazumon kaj, rigardante la paperon de malproksime laŭ maniero de malmiopuloj, li ekskribis per forta mano, per grandaj kaj pintformaj literoj. Nin interesas nur la parto, kiu koncernis la hundon kaj ĝi tekstis:

„Vian deziron mi plenumis senprokraste kaj ne hezitante mi iris rekte al Dagobert Hornys. Vi ne povis opinii iun alian ol Dagoberton Hornys. Kvankam en Praha ekzistas multaj tre mal-largaj stratetoj, kiuj malbonodoras tre homece

ne nur antaŭ pluvo, sed ankaŭ dum pluvo kaj post pluvo, sed sole en unu tia strateto estas vendejo de malgranda kvarpieda kaj plumhava bestaro, kaj tio estas la butikoj de Dagobert Hornys, proksime al Spálená-strato. Al ĉi tiu homo mi direktis do miajn paŝojn kaj komunikis al li, kion vi komisiis al mi. Kaj mi venis dum feliĉa momento. Ĝus li havas vendebla tre perfektan, purrasan, unujaran foksterieron kaj postulas por ĝi cent kronojn. Feliĉ'okaze li havas ankaŭ ĝian amatoran, memfaritan fotografajon — li fotografis la hundon, kiam ĝi embuske staris super musa truoj. Belega pozicio! Mi ordonis do, ke li tuj sendu al vi la fotografajon — postmorgaŭ vi havos ĝin — kaj ke li rezervu la hundon ĝis via respondo. Plej bone vi aranĝus la aferon per telegrafo. Fakulo, kapitano Krohl, kiun mi invitis al la esploro, konfirmis al mi, ke 1) la besto estas de sendifekta raso, 2) ke ĝi havas neriproĉindan staturon kaj 3) ke al frato ĝi valoras minimume cent kronojn. — Ĉion pluan intertraktu senpere kun Dagobert Hornys, kiu estas pruvita specialisto kaj ĉiurilate serioza firmo. — Mi rimarkigas ankoraŭ nur, ke ĉi tiu fokso, kiu ankaŭ aŭdas je la nomo „Fokso“, havas tre belan, simetrian maskon (desegnaĵon sur la vizaĝo) kaj ke ĝiaj gepatroj ricevis la unuan premion dum la antaŭpasintjara ĉi tiea hund'ekspozicio. Vi vidas do, ke ĝi devenas de

bona familio. Hornys asertas, ke ĝi ne ĉagrenos vin kaj ke ĝi povus esti modelo en ĉiu eduka instituto. Entute ia hunda miraklo — laŭ asertoj de Dagobert Hornys.“

Per tio finiĝis la tasko de sinjoro majoro Votruba. Pluaj diplomataj intertraktoj okazis poste nur inter sinjoroj kolonelo Goljat kaj zoologo Hornys. Pli poste enmiksiĝis sin ankaŭ aliaj instancoj — sed tion oni lasu al la evoluo de ĉi tiu rimarkinda okazaĵo. Oni ne antaŭkuru. —

Du tagojn pli poste estis enmanigita al sinjoro Dagobert Hornys jena telegramo:

„Fotografajo kontentigas. Se ofertita hundo precize portretita, mi aĉetas. Duonprezo per poŝtmandato, reston poŝt ricevo de besto. Sendu eksprese per rapidegtraĵo! Kolonelo Goljat.“

Dagobert Hornys alpaŝis belaspektan budeton en angulo de sia vendejo kaj parolis en ĝin preskaŭ kortuŝe:

„Vidu, Fokso, jam vi estas vendita kvazaŭ Jozefo de Egiptujo! Sed estu kontenta, vi venos al bona sinjoro, al kolonelo, vi havos indan oficon. Tia sinjoro scias, kiel trakti tian pursangan beston. Li estimos vin kaj havos memoraĵon je Praha. Kaj vi konduku honeste. Ĝis Polujo vi venos, preskaŭ al la rusa landlimo. Pecegon da mondo vi vidos, friponeto, kaj havos bonajn spertojn. Salmanĝu kaj morgaŭ matene vi veturos. Preskaŭ nevolonte mi adiaŭas vin, sed por parado mi

ne povas vin havi. Vi kadukiĝus ĉi tie. Viaj talento kaj kapableco vokas vin aliloken.“

Fokso kun konvena atento finaŭskultis la alparolon de sia estro kaj, kiam ĝia ĝisnuna nutranto finis, ekbojis Fokso laŭtege: „Haf, haf, haf!“

Tio signifis verŝajne, ke ĝi komprenas sian estron, ke ĝi konsentas, ja eĉ ĝojatendas la longan vojaĝon.

Frumatene sinjoro Hornys enigis la karan Fokson en fortikan keston, en kies kovrilo estis krado, kaj unu horon pli poste la kvarpieda turistoj en la kesto estis ŝovita en vagonon de rapidegtraĵo, kiu forveturas el la ŝtata stacidomo en Hybernská-strato.

Kiel ajn estu imaginta la kara pasaĝero sian vojaĝon per rapidegtraĵo laŭ la vortoj de sinjoro Hornys, certe estas, ke la efektivaĵo nepre ne kongruis kun la imago. Ĝi supozis, ke ĝi vidos do pecegon da mondo, sed el sia kesto ĝi vidis nepre nenion. Ĝi konkludis eble, ke ĝi veturos en ia societo — ankaŭ tio estis erara konkludo. Ĝi sentis nur, ke io kun ĝi forkuras, ke la kesto — ĝia malliberejo — tremas kaj ŝanceliĝas, de tempo al tempo eĉ saltetas, kvazaŭ diablo skuus ĝin, kaj ĉiu tiu ĉi sovaĝa movo estis akompanata per inferaj bruego, zumado, kurado, ĝemado, frapado kaj per diversaj aliaj sonegoj, por kiuj ĝi eĉ ne havis ĝustan esprimon en sia — spirite malriĉa — hunda lingvo kaj pensado.

Komence ĝi estis ege konsternita. Pli poste ĝi rabiiĝis kaj bojadis kaj ĝemblekadis intencante eldevigi per tio, ke oni liberlasu ĝin el la kesto. Preskaŭ ĝi raŭkiĝis — sed neniuj atentis ĝin. Ĝi kvietiĝis do, kaŭriĝis en angulo de sia kaĝo kaj tremis pro angoro, kio okazos ankoraŭ. Kaj fine ĝi estis venkita de grandega laciĝo.

La ŝanceligilo kelkfoje haltis kaj Fokso ĉiufoje stariĝis esperante, ke oni liberlasos ĝin el la kesto. Vana trompiĝo! Ĝi aŭdis nur diversajn ekkriojn, sed ne komprenis, ke ili signifas: Kolín, Pardubice. Kaj pli frue ol ĝi konsciiĝis, denove tio bruegis pluen.

Nur nun ekhaltis la traĵo pli longan tempon — al Fokso estis tute indiferente, kie tio okazis. Ekknaris radetoj sub la pordo de la ŝarĝvagono, en la vagono pliheliĝis kaj tra la krado falis luma radio en la hundan malliberejon. Ies mano ektuŝis la keston, tiris ĝin al la vagonrando kaj post ia manipulado ĝi forigis aŭ nur malfermis la kradon.

Tion faris ŝtacia dungito — ie en Choceň, aŭ Třebová — kies tasko estas, ĝuste en ĉi tiu ŝtacio doni al vivaĵoj akvon, eventuale ankaŭ nutraĵon por refreŝigo.

La dungito sciis bone, kio estas farota en la kesto, sed Fokso ne sciis tion. Fokso laŭŝajne opiniis, ke ĝi devas „elŝtupi“ — la kondukistoj vok'invitis ja al io simila. Sed eĉ se ili ne invitis,



Fokso estis ĝuste sata de tiu frenezega veturo kaj, kiam la krado super ĝi malfermiĝis kaj kiam ekblovis al ĝi fluo de freŝa aero — ne meditante kaj ne demandante ĝi elsaltis dum laŭtega bojado, la stacia dungito ekŝanceliĝis pro ektimo kaj en plej proksima momento ne restis eĉ postsigno de Fokso. Atentante nek „Elirejon“ nek la stacian dungiton, kiu reprenis tie vojaĝbiletojn de elirantaj pasaĝeroj, Fokso, kiu cetere ne havis vojaĝbileton, kuregis sencele ien, direktante sin sole laŭ sia instinkto. Kaj se ĝi en tiu momento meditis pri io, certe ĝi decidiĝis, ke ĝi ne plu eniros tiun kaĝon kaj tiun malbenitan ŝanceligilon. Kaj kiu konas hundojn de tia temperamento, kian havis Fokso, kredos, ke ĝi restis fidela al sia decido kaj ke ĝi — ne revenis.

Sed intertempe staris tute konsternita la malfeliĉa trinkigisto de vojaĝantaj hundoj apud la malplena kaĝo kaj kvazaŭ hipnotigita li postrigardis la forkuregantan Fokson.

„Jezuo, Maria, Jozefo — tiu bestaĉo entute forkuris!“ li ekĝemis. Unuamomente li ekintencis postkuri la bestaĉon por kapti ĝin kaj la dekstra piedo ekflugis jam antaŭen, sed en la sama momento la malfeliĉa dungito konsciiĝis pri la tuta teruro de la afero. La trajno pluveturos post kelkaj minutoj — ĝis tiam denove devas esti en la kesto hundo kaj la krado super la hundo devas esti fiksita — sed kiel kapti la malbenitan for-

kurinton, se ĝi entute ne estas videbla — kaj krom tio li devas eviti alarman bruon, li ne povas konfesi sian malatenton por ne havi malagrablaĵojn kun siaj superuloj. En tiaj cirkonstancoj estis bona konsilo efektive tro kara!

Sed krizaj momentoj rezultigas ofte nekredindajn ideojn kaj kuraĝon. Io simila traflugis nun la cerbon de la dungito, kies tuta ekzistado — eble — estis en danĝero. La loĝejo de ĉi tiu viro ne estis malproksime — kaj en la loĝejo gardis lia fidela hundo, hundo Nukso, lia ĝojo dumtage kaj lia fidela akompananto dumnokte, kiam ĝi kun sia estro garde rondiradis la stacidomon, preter tenejoj kaj preter aregoj da karbo.

Kelke da saltpaŝoj kaj la viro estis en sia loĝejo.

„Nukso!“

Nukso alkuris flate alpremante sin.

„Rapide post mi!“

Nukso postkuris la estron al la vagono. Kaj jen, neatendite ĝia estro kaptis ĝin je la „kolumo“, levis ĝin kaj ĵetis en la kaĝon de Fokso, la krado super ĝi frapfermiĝis, la viro ekĝemis ankoraŭ „Nukso, mia kara Nukso!“ — Laŭlonge de la trajno eksonis la vok'anoncoj: „Prete!“ — La trajnestro trumpetis, ĉiuj vagonoj ekskuiĝis, la trajno ekmoviĝis — Nukso vojaĝis al Polujo.

II.

La rapidegtrajno bruegadis, fonderadis kaj spiregadis pluen al la orienta landlimo, ĝi malgrandiĝis kaj malŝveliĝis, ke ĝi aspektis kvazaŭ infana ludilo, fine ĝi malaperis entute, kvazaŭ ĝi estus falinta post la horizonton kaj sole la disiĝanta nubo de blanka fumo malproksime montris ĝian postsignon.

Sed en la stacidomo (Choceň aŭ Třebová) staris ankoraŭ malfeliĉa viro kun larĝe dismetitaj piedoj, kvazaŭ glaciiginta, sen vivo kaj sen animo. Lia animo flugis post la rapidegtrajno kaj estis evidente, ke ĝi elflugis tra la larĝe malfermitaj okuloj, kiuj — kvazaŭ vitrecaj — rigardis nun post la malaperinta trajno, post la ŝarĝvagono, post la fatala kaĝo, en kiu tremis la malfeliĉa Nukso.

Tiu viro, kiu staris kvazaŭ enradikiĝinta en la peronon, kiu rigardante ne vidis, ne aŭdis kaj ne spiris, estis Matyáš Punčocha, per dekreto definitive dungita lampisto, nokta gardisto kaj trinkigisto de vojaĝantaj hundoj en la menciita stacio. Li staris ĉi tie ne komprenante, kio okazis dum la ĵus pasintaj kvin minutoj. Nukso, lia fidela, neanstataŭebla Nukso estas for kaj neniam —

neniam ĝi revenos plu! Kaj li — Matyáš Punčocha — per la propra, dekstra, kruda mano mem ekkaptis ĝin je la haŭto ĉe la kolo, ĵetis ĝin en la kaĝon, frapfermis super ĝi la mallarĝan kradon — ho, malbenita momento!

Lia animo iom post iom revenis, la koro ek-sangis. Por savi sin, li oferis Nukson!

Intertempe ni ne ĝenu Punčocha-n en lia doloro, kiun ni nepre ne kapablas kvietigi. Ni eble revenos ankoraŭ al li, eble ni renkontos lin dum iu pli gaja momento, se dum lia plua vivo entute ia ĝojo atendas lin. Ni dediĉu iom da atento al lia Nukso, al kiu estas destinite — sub pseŭdonimo — entrepreni longan vojaĝon al malproksima Polujo.

Mi supozas, ke ne ekzistas leganto nur iom vivsperta, kiu ne scius, ke Nukso estas animalo kvarpieda, ke ĝi estas suĉbesto havanta ruĝan sangon, ke ĝi estas plej fidela amiko kaj kunulo de la homo, per unu vorto, ke Nukso estas hundo. Tio estas, kion oni povas diri ĝenerale. Sed malpli facile, se ne tute neeble, estas priskribi la „personecon“ de Nukso. Ĉar kiom da Nuksoj ekzistas en nia patrujo, ĉiu aspektas alie, ja, kelkfoje havas tia Nukso eĉ alian nomon: Aleneto, Hafeto, Lumpeto, Punkteto — ho, kia amaso da nomoj kun la karesa finaĵo -eto! — sed ĉiu el ili estas ano de la granda Nuksofamilio.

Se deveno de la hundo entute estas kaŝita per

nepenetrebla vualo, des pli mistera estas deveno de Nukso! Pri deveno de hundo oni scias ĝis nun entute nenion certan kaj ĉiuj natur-konistoj, -esploristoj, -sciencistoj kaj -verkistoj nur supozas unuanime, ke la hundo estas posteulo de la eŭropa lupo. Sed la malrapida ŝanĝo de lupo en sindonan, fidelan kunulon kaj helpanton de homo, en hundon, okazis en pratempoj, ke eĉ la sumo de ĉiuj ekzistantaj kronologioj, hebrea kun kristana, turka ankaŭ kun tiu, laŭ kiu oni kalkulas ĝis la antaŭkristana estinteco, estas sensignifa momenteto. Jam antikvaj Egiptoj postlasis al ni sur siaj ilustritaj arkitekturaj memoraĵoj bildon de tiel perfekta hundo, ke ni povas senĝene kalkuli, ke pasis minimume miliono da jaroj, ĝis kiam ĝi formiĝis de lupo al tia belstaturoco. Iu malpravigu nin!

Sed lupo kaj — Nukso! La genealogio de nia kara Nukso estas certe tute alia. En ĉi tiu sindona estaĵo estas eĉ ne iom da lupa naturo. Ja, dum plej granda ekscito kaj dum furioza ataka bojado estas Nukso pli komika ol terura, pli karikaturo ol danĝera, kion rezultigas ĉefe ĝia malgranda, eta staturo.

Bedaŭrinde la severa scienco kondukas al Nukso tute indiferece. Mi serĉegis en ĉiuj por mi akireblaj publikaĵoj, sed nenie mi trovis eĉ nur vorton pri Nukso. Mi enrigardis la verkon de Brehm, kiu rakontas tiom da belaj anekdotoj

pri diversaj surteraj estaĵoj — ĉi tiufoje eĉ Brehm malkontentigis min. Pri Nukso li scias neprenenon.

Mi klarigas al mi la aferon tiel, ke Nukso ekzistas en tiom da variaĵoj, ke ĝi mem bezonus tutan volumon kaj la volumo estus ankoraŭ nekompleta. Ĉar en la vejnoj de Nukso cirkulas tia miksaĵo de hunda sango, ke eĉ la plej facilanima natursciencisto ne kuraĝis ĝis nun eĉ de malproksime nur indiki, al kiu hunda speco Nukso apartenas. Ĉar je la formo de Nukso laboris ne nur epokoj, ne nur sennombraj generacioj, sed verŝajne ĉiuj hundospacoj, ĉiuj rasoj, kiom da ili ekzistas. Kaj estas mirinde, ke la kontraŭuloj de Darwinteorio pri „natura elekto“ ne ekkaptis ĉi tiun argumenton, Nukson, per kiu tiuj oni estus forigintaj la menciitan teorion. Ĉar se entute io en la mondo estiĝadis sen kiu ajn elekto nur per nepra hazardo, dum renkonto, sen kiu ajn konsidero de la raso aneco, do tio estas Nukso. Ĉiu sangoguto en ĝi devenas de alia antaŭulo, kaj Nukso heredis ion de ĉiu en la senfina legio de siaj antaŭuloj kaj la kompatindulo eĉ ne scias, al kiu ĝi dankas tion. Kaj ĉar eĉ Nukso mem ne restis pasiva koncerne daŭrigon, oni facile povas imagi, kia mistera zoologia komposicio troviĝas en ĝi. Kaj senfina estas la skalo de nuancoj koncerne staturon, formon de kapo, nazon, orelojn, krurojn, voston,

koloron kaj kvaliton de hararo. Ekzistas ne nur regionoj, sed unuopaj vilaĝoj, ja eĉ solejoj, kiuj fieras pri sia aparta rasa speco de Nukso. Ekzistas nigraj, blankaj, brunaj, rustkoloraj, grizaj, multkoloraj, striitaj, ŝprucmakulaj Nuksoj; ilia hararo estas vila, longa, densa kaj male glata, maldensa, mallonga. Ekzistas Nuksoj kun mallongaj kaj male kun longaj kruroj, ili estas sveltaj, malgrasaj kaj male dikventraj kiel kolbasegoj. Ekzistas Nuksoj, kiuj havas longigitajn kapojn kun proporciaj nazoj kaj aliaj male havas kapojn kiel globojn kaj buŝegojn malpintajn kun hirtaj lipharoj. Per unu vorto, ne ekzistas preskaŭ formo, netrovebla ĉe iu Nukso.

Nukso estas preskaŭ ĉiam besto sindona — almenaŭ al sia estro — malofte ĝi estas ĉagrenema. Sed ekzistas Nuksoj, kiuj amikiĝas kun ĉiu, kiun ajn ili renkontas. Mi mem konas Nukson — ĝi havas kompreneble alian nomon — kiu kondukas al ĉiu same ĝentile, ke oni eĉ embarasiĝas. Trajno haltas en la stacio Ĥevnice. Mi elsaltas el la vagono. Jen, la unua, kiu salutas min, estas Nukso. Poste ĝi akompanas min modeste ĝis mia hejmo. Ho, kiel gajniĝas ĝia vizaĝo, se mi alparolas ĝin afable — kredu aŭ ne kredu tion, sed sur ĝia vizaĝo aperas rido, nedubebla rido. Kaj post kiam ĝi akompanis min kaj ekkonis, ke mi estas sub sekura tegmento, galope ĝi revenas al la stacidomo, por atendi tiujn, kiuj

alvenos per pli posta trajno. Mi supozas — ne, mi nepre scias tion, ke ĉi tiu Nukso precize scias la horaron, ĉu la dumsomeran, ĉu la dumvintran, ĝi malzorgas eĉ ne unu trajnon, ĝi konas ĉiujn, kiuj ekskursas al Ĥevnice, ĉiujn ĝi bonvenas, ĉiujn akompanas. Kaj kiam mi reveturas al Praha tiuj kiam mi eliras el mia ĝardeno, jen Nukso sidas antaŭ la pordeto kvazaŭ mendita, antaŭ ĉio ĝi deziras al mi: „Bonan matenon“ desegnante per sia senlaca vosto nereprodukteblajn arabeskojn en la aero kaj poste ĝi trovas post mi al la stacidomo. Ĝi scias pri mi, ke mi veturas per ĉi tiu trajno, kaj pri la najbaro, ke li veturos per la pli posta trajno. Kaj tiamaniere ĝi vagas la tutan tagon tra la urbeto, ĝi bonvenas, akompanas, adiaŭas — kaj la kompatindulo ricevas nek de la komunumo nek de la loka „Plibeliga Societo“ eĉ nur heleron aŭ duonparon da kolbasegoj por ĉi tiu afabla agado „je pligrandigo de la fremdultrafiko.“

Tia estas Nukso. Laŭaspekte nerimarkinda, kelka el ili eĉ kvazaŭ kungluita el stupaj ĉifonoj, kun hirtaj kaj malglataj haroj, malofte pura, kombita, pli eble dum la tuta jaro malpura kvazaŭ diablo, havanta orelojn iom disŝiritajn kaj sur la tuta korpo cikatrojn pro ofta luktado kun kamaradoj kaj rivaloj (kio cetere atestas nur ĝian propran kuraĝon), sed ĝentila, bona, zorgema. Ĉu vi ne sentas sinceran bedaŭron

aŭdante malrespektan esprimon de arogantaj fakuloj, ke Nukso efektive eĉ ne estas hundo? Tio estas kompreneble tre kuraĝa, nepruvita kaj, se oni konsideras entute misteran devenon de la hundo, malsaĝa opinio.

Nu proksimume tia estis la Nukso de Matyáš Punčocha, kiu anstataŭante la forkurintan Fokson devige ekveturis al Polujo, por esti kunulo kaj akompananto de la kolonelo Goljaŝ en lia fraŭla soleco kaj dum liaj promenoj tra la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Pro mirinda kaprico de la naturo kaj pro neesploreblaj leĝoj de heredeco estis la hararo de Nukso interese kolorita. En ĝi alternis la koloroj nigra, bruneta, rustkolora kaj blanka en tiel regulaj desegnaĵoj, ke Nukso aspektis kvazaŭ kvadratumita. Ĉi tiu koloro instigis la deĵorkamaradojn de Punčocha al ne tro bonaj spritaĵoj, ke iam, ĝis kiam Nukso pereos, Punčocha povos kudrigi al si „kvadratumitajn“ pantalonojn el ĝia haŭto. Sed tuj aldonis aliaj, ke la haŭto de Nukso sufiĉus maksimume je unu pantalonotubo kaj ke Punčocha zorgu do ĝustatempe pri tio, ke li havigu al si ankoraŭ unu samkoloran Nukson. Kompreneble estis pli facile doni tian konsilon, ol efektivigi ĝin. Serĉu du samajn Nuksojn!

Kaj ĉi tiu Nukso venis do feliĉe al Polujo, oni avizis sinjoron kolonelon Goljaŝ pri ĝia alveno kaj post ofica manipulado ĝi estis elliverita.

Oni povas imagi, kiel malfermegis okulojn la sinjoro kolonelo, kiam oni transdonis Nukson al li.

„Ĉu tio venis je mia adreso?“ li ekkriis pro mirego. „Ĉu tio alvenis per rapidegtraĵo? Eksprese?!“

Nenia dubo. La akompanadokumentoj de Nukso estis en ordo. La identeco de la sendaĵo ne povis esti dubinda.

„Krajc'himl'element'donr'und'doria“ ekkriis la kolonelo germanlingve, ĉar ĝuste en germana lingvo li scipovis plej bone malbeni kaj insulti. „Ĉi tiu kreaĵaĉo estas mia mendita hundo? — Fokso? — Por cent kronoj? Ho, vi vilaĉa, mizera, idiota estaĵo!“

La kolonelo saltpaŝis al la tablo, prenis la fotografiaĵon de la hundo, laŭ kiu li mendis ĝin, rigardis la fotografiaĵon, rigardis la malfeliĉan, pro timo tremantan, Nukson kaj ne kapablis reteni ekridegon. Kompreneble furiozan, koleregan, venenan ridegon.

Nu kompreneble la fotografiaĵo de Fokso ne prene kongruis kun la viva liveraĵo. La bedaŭrinda Nukso eĉ ne iom similis la viglan Fokson streĉstature embuskantan super musa truon kun suprenlevita, malantaŭen streĉita vosto.

La ridego de la kolonelo finsonis kaj ne ripetigis plu. Liaj okuloj ruliĝis, la vizaĝo kovriĝis per trajto plena de rifuzo kaj malamo, pro

kolero ĝi paliĝis. Li estis trompita, eĉ trompegita. Li sendis antaŭpage 50 kronojn, 50 kronojn li devas postpagi ankoraŭ kaj jen oni sendas al li bestaĉon, kiu — laŭ lia opinio — eĉ ne valoras, ke oni akceptu ĝin kiel trovaĵon.

„Tio estas senekzempla friponaĵo!“ eksplodis la kolonelo. „Pro Jezuo Kristo, ĉu tion ĉi vidis majoro Votruba?! Kaj tion li laŭdegis al mi?! Kaj por tio li bezonis eĉ fakulon?“ — Ne, tio ne estas ebla — tio estas ruzaĵo de tiu malbenita birdvendisto! — Li opiniis: al Polujo taŭgas ĉio — tiu Goljaĵ estas malproksime — la hundon li havos jam en siaj manoj, li traktu ĝin, kiel plaĉas al li! Ho vi fripono!“

La kolonelo ekkraĉis. La afero preskaŭ mal-sanigis lin. La vendisto de birdoj, simioj, sciuroj kaj ranoj kuraĝas ridindigi lin, kiu ankoraŭ antaŭ nelonge tremigis regimenton da soldatoj.

Sed iom post iom la kolonelo kvietiĝis. Denove li rigardis la fotografiaĵon, de la fotografiaĵo li turnis la okulojn al Nukso, kiu kaŭris en ĉambra angulo kaj tute timigita rigardis la kolonelon, kvazaŭ atendante mortigan baton. Ho, Nukso nepre sentis, kiel nebonvena ĝi estas sub ĉi tiu tegmento — ho, Nukso kun plezuro denove estus rampinta en la malbelan keston en malhela vagono, se ĝi sciis, ke oni veturigis ĝin al ĝia iama estro en la malgrandan dometon, en kiu ne brilis ĉio pro lukso, kiel ĉi tie, en kiu tamen

estis tiel hejmece, en kiu ĉiu angulo estis konata al ĝi. Sed la fizionomio de la kolonelo heliĝis, ja eĉ rideto preskaŭ bonanima aperis sur ĝi. Li frapetis la fotografiaĵon per fingro kaj rigardante paceme Nukson li diris:

„Mi maljuste suspektas la praha-an hundeksportiston. Estas neeble, ke li volus tiel trompi min. Temas pri eraro — nome pri eraro farita de la fervojo. Oni elliveris simple alian hundon al mi. Oni intermiksas du sendaĵojn. Tiel staras la afero. Kaj eble la ĝusta Fokso troviĝas ankoraŭ en la fervoja magazeno. Senprokraste mi devas iri tien.“

Dirite, farite. Li ekintencis kunpreni la hundon, por montri ĝin al la fervojaj oficistoj, sed rigardinte ankoraŭfoje Nukson li rezignis efektiviĝi ĉi tiun intencon.

„Ne, kun ĉi tiu estaĵo mi ne povas montri min en la urbo. Tio estas diabla hundo. Kaj ĝi aspektas — nu kiel mi diru, ke ĝi aspektas — tiel strange — ĝi aspektas kvazaŭ pantoflo plektita el diverskoloraj drapostrioj.“

En la sama momento Nukso ekululis tirsone, kvazaŭ divenante, al kio tiu ĉi nekonata sinjoro ĵus komparis ĝin.

„Vi sentas angoron, ĉu vere?“ alparolis ĝin indulge la kolonelo. „Tion mi kredas, kamarado. Se mi estus en ĉi tiu via haŭto, mi ankaŭ ne estus bonhumora kaj ululus eble eĉ tutan tagon.“

Aŭ mi dronigus min en plej proksima lageto. Nu silentu, mi supozas, ke baldaŭ vi estos en ĝustaj manoj.“

Post kvaronhoro estis la kolonelo en la stacidomo kaj post plua kvaronhoro li trovis feliĉe la oficiston, al kiu oni sendis lin.

„Sinjoro,“ li diris ruze, „per la hodiaŭa rapidegtrajno alvenis du hundosendaĵoj, ĉu ne?“

La oficisto enrigardis iajn dokumentaĉojn.

„Ne, sinjoro, nur unu. Tio estis cetere la unusola sendaĵo de viva hundo dum la lastaj kvin tagoj. Ĝi estis forsendita el Praha kaj estis adresita al kolonelo Goljaŝ.“

„Kolonelo Goljaŝ estas mi.“

„Tre agrable, sinjoro kolonelo. Sed laŭ la dokumentoj mi vidas, ke la sendita hundo estas jam elliverita al vi.“

„Hundo estis elliverita al mi,“ ĵesis la kolonelo, „kaj eble, ke tio estis la sendita hundo, sed ne prene la hundo mendita de mi. Mi mendis foksterieron kaj ricevis ian malbonkvalitan, senrasan bestaĉon, sen genealogio, per unu vorto sen valoro, estaĵon naskigitan ie sub pendigilo, birdotimigilon!“

La oficisto skuis la ŝultrojn.

„Sinjoro kolonelo, ni enmanigis, kion la trajno alportis. Se la sendaĵo ne konvenas, estas necese plendi ĉe la liverinto.“

La kolonelo eksiblis.

„Kompreneble mi plendos! Kaj kiel! Se vi vidus la hundaĉon! Tio estas io nevidata, neaŭdata.“

„Eraron oni neniam povas eviti, sinjoro kolonelo,“ ekridetis la oficisto.

„Sed ne temas pri eraro!“ eksplodis la kolonelo. „Temas pri trompo! Pri kriminala okazaĵo!“

La kolonelo iom post iom perdis prudenton. La oficisto ridetis embarase kaj silentis. Laŭ siaj spertoj li sciis, ke per ĉiu plua vorto li verŝus nur oleon en fajron.

La kolonelo adiaŭis kaj foriris. Li paŝadis kaj per kana vergo li frapadis sian tibikarnon. Li kunpremis la dentojn, sed kio bruis en li, eldevigis eliron al si.

„Fripono! Do tamen nur li! — Viraĉo, se mi havus vin ĉi tie, mi enigus vin kune kun via hundaĉo en sakon kaj skuus vin tiel, ke neniu ekkonus, kiu el vi havas du kaj kiu kvar piedojn!“

Post momento li moderiĝis.

„Ne, neeble. Verŝajne eraris iu lia helpanto. Mi scias, ke tiuj heplantoj estas malsaĝuloj. Ĉu mi ne havis tiajn mallertulojn en la regimento?“

Subite la kolonelo ekhaltis.

„Sed la afero devas esti klarigita ankoraŭ hodiaŭ!“

Li turniĝis sur la kalkano, ekcelis al poŝtoŝtanco.

Kaj la saman tagon estis interŝanĝitaj jenaj telegramoj inter la kolonelo kaj la praha-a liverinto:

(Al Praha.) „Anstataŭ mendita Fokso venis sennoma, senrasa bestaĉo. Ne akceptita, disponu. Tuj klarigu eraron telegrafe. Goljat.“

(El Praha.) „Neniu eraro, mi ekspedis persone, precize laŭ mendo. Komparu fotografiaĵon. Mi atendas restpagon. Hornys.“

Kiam venis la respondo de Hornys, la kolonelon preskaŭ atakis apopleksio. Kaj plejmulte ekscitis lin la lastaj du frazoj.

„Komparu fotografiaĵon!“ li premis tra la dentoj. „Mi atendas restpagon!“

„Kanajlo!“ li ekkriis subite furioze, ĝis la plafono ektremis super li — kaj samtempe Nukso ektremis kaj maldikiĝis je duono en angulo post la forno. Ĝi konis la vorton „kanajlo“, de tempo al tempo ĝi aŭdis ĝin de sia iama estro, Matyáš Punčocha, kiam ajn ĝi iel pekis; kutime sekvis tiun insulton bato. Nukso atendis nun ion similan kaj tremis nur.

„Kanajlo!“ ekkriis la kolonelo la duan fojon. „Li mokas min. — ‚Komparu fotografiaĵon!‘ — Mi komparis jam, vi rabisto! — ‚Mi atendas restpagon!‘ — Atendu, vi malnoblulo, mi enpoŝigos skurĝon, veturos al Praha kaj postpagos al vi, ke vi eĉ ne kapablos kalkuli tion!“

Tiun tagon la kolonelo ne kapablis plu fari ion

kaj tiun nokton li ne dormis. Sed matene post la manĝo li eksidis kaj skribis leteron al la malbenita liverinto. Ke la tuta afero tuj de la komenco ŝajnis suspektinda al li. Ke precipe suspekta estis la fotografiaĵo. Ke la tuja alsendo de la fotografiaĵo estis suspekta. Ke ĉio lasis konkludi, ke la afero estas intrige aranĝita, preparita. Ke ia interna voĉo avertis lin, sed bedaŭrinde li ne obeis kaj forsendis la antaŭpagon de kvindek kronoj. Ke li fidis, ke ano de la frata ĉeĥa nacio ne trompos lin, sed ke li estas pro sia fido terure kaj neripareble seniluziigita. Ke li postulas tujan repagon de la senditaj kvindek kronoj, alie li ekprocesos. — Sed fine la kolonelo moderiĝis kaj aldonis la supozon, ke verŝajne tamen nur okazis eraro, kaj ke li atendas, ke sinjoro Hornys klopodos, plibonigi ĉion, kaj senprokraste sendos la ĝustan Fokson.

La kolonelo senpacience atendis respondon. Li ĝisatendis ĝin kaj ĝi estis ne malpli kruda. Sinjoro Dagobert Hornys estis ja komercisto nepre ĝentila. Sed li estis fiero pri sia firmo, pri sia reputacio kaj, estante incitita de la kolonelo, li ankaŭ skribis en la sama tono, ne tro ĝentile. Ke la pola mendo tuj estis tre suspekta al li. Ke li ne estus perdinta eĉ unu vorton kaj sen bedaŭro estus cedinta la tutan negocon al kiu ajn, ne postulante eĉ heleron da kompenso, sed ke li efektivigis ĝin nur pro komplezo al sinjoro

majoro Voŭruba, kiun li tre ŝatas. Ke li ofte estis avertata ne okupi sin per tiaj dubindaj negocoj eksterlanden, sed ke li esperis, ke ano de la frata pola nacio kondutos kavalirmaniere. Sed ke tiurilate kompreneble li ege disreviĝis. Ke li konas ja ankoraŭ unu tian honestulon, kiu volus du Foksojn por kvindek kronoj, sed ke li ne konas la malsaĝulon, kiu donus du Foksojn por ĉi tiu sumo. Fine li menciis, ke per propraj manoj li „enpakis“ la menditan Fokson en keŝton, akompanis ĝin al la stacio, ke ia eraro estas tute neebila. Kaj ke li postulas dum tri tagoj la restpagon de kvindek kronoj kaj kompenson de la sendkostoj, aliokaze li ekprocesos.

Supozeble ne necesos konfirmi, ke per ĉi tiuj „batalaktoj“ la konflikto ne povis esti kontentige ordigita. Per proceso minacis kolonelo Goljaŭ, per proceso minacis sinjoro Hornys. Ĉu vi antaŭsentas jam, kiel maturiĝis la tuta afero? Nu, memkompreneble advokato eklaboris pri ĝi kaj poste juĝtribunalo. Tion oni pritraktos en la venontaj ĉapitroj.

III.

Komence de ĉi tiu rakonto mi ne supozis, ke evoluigante ĝin mi estos devigata ankoraŭfoje ĝeni sinjoron majoron Voŭruba en lia ripozo. Sed tia estas la evoluo de okazaĵoj. Kaj fine ĉu estas mirinde, ke kolonelo Goljaŭ serĉegante advokaton kaj ne konante mem individuajn personojn en Praha, denove turnis sin al sia amiko Voŭruba? Do tial sinjoro majoro nelonge post ricevo de la unua letero el Polujo estis surprizita per alia letero, kaj la esprimon „surprizita“ mi uzas ĉi tie neniel laŭ la rakontista kutimo, por ornamo kaj beligi la stilon. Sinjoro majoro estis efektive tre surprizita per la enhavo de la dua letero, ĉar neniamokaze li estus atendinta, kian rezulton havos lia misio ĉe sinjoro Hornys koncerne la foksterieron elektitan por la kolonelo Goljaŭ.

Post senkulpigo pro denova ĝeno la kolonelo koncize priskribis al la majoro, kio okazis, kiel li estis trompita, kaj daŭrigis, ke nun restos al li nenio alia, ol transdoni la tutan aferon al advokato, por ke li prilaboru ĝin de la fundamento tiel, ke la senkonscienca hundoliveranto dronu en sia trompo, ke li neniam plu en la vivo kuraĝu

similan, malhonestan, embuskan kaj rabistan manipulacion.

„Mi scias bone,“ skribis la kolonelo. „ke vi estas kulpa pri nenio. Vi estas kulpa nek pri malbonaj homoj, nek pri aĉaj hundoj. Sed se vi iam hazarde ekvidos, kion tiu malbenita hundo-vendisto sendis al mi anstataŭ hundo, vi ek-miregos kaj eble eĉ ne komprenos, ke mi ne freneziĝis pro kolerego. Hodiaŭ do mi petas vin, ke vi rekomendu al mi iun bonan, energian advokaton, „akran kiel razilo“. Kiom mi rememoras, estas en Praha sufiĉe da ili. Vi scias, pri kio temas, do vi bone konsilos min. Mi rajtigas vin, ke vi donu al li provizorajn „species facti“. Li agu senkompatе kaj tiru el tiu trompulo konsiderindajn monsumojn. Li sendu al mi rajtigilon por subskribo, poste — memkompreneble — mi sendos la necesan antaŭpagon. Mi scias, ke tio estas la ĉefa afero en ĉiu proceso. Sinjoro Hornys pagos ja ĉion pli poste!“

Pro ĉi tiu militdeklaro venis proksimume post unu semajno en la vendejon de sinjoro Hornys dro. Břetislav Topŭrko, advokato deziregita de kolonelo Goljať. Li estis rekomendita de la majoro al la kolonelo ne nur kiel „razilo“, sed ankaŭ kiel homo prudenta, rapidsprita, armita ĝis la dentoj, kiu iras por sia kliento senhezite en akvon kaj en fajron, precipe se la antaŭpago estas adekvata al la objekto.

La advokato sciigis la hund'eksportiston, kial li venas, ke li estas komisiita ekprocesi, sed laŭ sia devo li volas provi, ĉu ne estus eble ordigi la aferon sen proceso. Konsiderante la procesobjekton, nome la hundon, kiun li sendis al sinjoro kolonelo Goljať, li donas al li amikan konsilon, ke li: 1. reprenu la hundon, 2. redonu la antaŭpagon de kvindek kronoj kaj 3. kompensu al sinjoro kolonelo ĉiujn elspezojn, kiujn rezultigis ĉi tiu malagrabla kaj de li — sinjoro Hornys — proprakulpe kaŭzita afero. Samtempe li akcentis, ke sinjoro kolonelo eĉ ne postulas kompenson de elspezoj por nutrado de la „koncerna hundo“ dum ĝi estas flegata de li.

Sinjoro Dagobert aŭskultis laŭŝajne trankvile, sed konvulsioj ĉirkaŭ liaj lipoj malkaŝis, ke li komencas ekscitiĝi. Lia vizaĝo, ĉiam ruĝa, ruĝiĝis ankoraŭ pli kaj pli, kaj kiam dro. Topŭrko finis sian parolon, diris la posedanto de la zoologia vendejo:

„Post tio, kion skribis al mi sinjoro kolonelo, mi ne devus paroli eĉ unu vorton kaj senhezite mi povus ekprocesi pro la restpago. Sed, por fari komplezon al vi kaj al sinjoro majoro Voľtruba mi respondas: Se la hundo estos resendita al mi sana, sendifekta kaj nemalbonigita, kion devas konstati fakuloj, mi reprenos ĝin kaj redonos la antaŭpagon dekalkulinte ĉiujn miajn

elspezojn. Sed al la hundo ne manku eĉ unu haro! Respekton!”

Post tio dro, Topŭrko reveninte en sian kancelarion diktis al la netskribisto Kaĉirek jenan leteron:

„Tre estimata sinjoro kolonelo!”

Koncerne vian aferon kontraŭ Hornys mi vizitis la kontraŭulon por ekprovi interpacigon. Kiom mi povis informiĝi, ĝenerale oni konsideras sinjoron Hornys viro kruda, nehipokrita, tamen komercisto solida. La saman impreson pri li havis ankaŭ mi. Laŭprincipe li ne estas kontraŭ interpacigo, kompreneble je certaj kondiĉoj. Mi rekomendas do al vi, ke vi senprokraste havigu al vi por’ĉiaman pruvon pri la identeco de la hundo. Estos necese havigi al si ĝian precizan fotografiaĵon, se eble en diversaj pozicioj, legitimi ĉi tiun fotografiaĵon per du juĝaj atestantoj, kaj redakti juĝan protokolon pri la afero. Mi rekomendas inviti ankaŭ veterinaron. Post kiam ĉi tiu por’ĉiama pruvo estos farita, resendu la hundon en senriproĉa stato kaj plej zorgeme pakita. Respektplene via k. t. p.”

La kolonelo Goljaŭ traleginte la leteron de la advokato frotis siajn manojn.

„Atendu nur, malbenita Dagobert! Mi efektivigos tian por’ĉiaman pruvon, ke vi ekmiregos!”

Kaj rigardante la kompatindan Nukson, kiu kaŭris en angulo de la antaŭĉambro ne rekon-

sciiginte ankoraŭ de ĉio, kio okazis al ĝi, li diris:

„Ĉi tiun bestaĉon fotografi! Tia honoro ne okazis al vi ankoraŭ, vi monstra bastardaĉo! Jes mi fotografigos vin de antaŭe kaj malantaŭe, de flanko kaj eble eĉ dum vi kuŝas sur la dorso suprenstreĉante la krurojn. Tia fotografiaĵo por la ĉiama pruvo estos vidinda! Kaj kisu vian estron anstataŭ mi, ĝis vi estos redonita al li. Li bonvenigos vin verŝajne kun ĝojo, ke li ree havas vin — kaj venontan fojon li ne decidiĝos plu tiom rapide, ke li postulu nur cent kronojn por vi. Eble li trovos iun, kiu donos du cent al li!”

La kolonelo ekridis per raŭka, venenplena rido kaj rapidis eksteren por aranĝi, kio estos necesa je la por’ĉiama pruvo.

Laŭ la alparolo de la kolonelo, laŭ lia malŝata ekrido antaŭsentis la kompatinda Nukso nenion bonan. Tamen la venontan tagon, kiam venis sinjoro en uniformo — militista veterinaro, bona konato de la kolonelo — kaj tuj post li ia stranga viro en civila vesto, sed kun uzodifektita soldatĉapo, kiu ligis al la kol’zono de Nukso fortikan ŝnuron, kaj kiam poste oni kondukis ĝin en strangan ejon, kiun Nukso ankoraŭ neniam vidis, en ejon kun vitra tegmento kaj plenan de stranga ilaro kvazaŭ en ia turmentejo, kie staris pluaj nekonataj viroj — nome la juĝaj atestantoj

— tiam ekstrems Nukso pro terura antaŭsento. Ne estis dubinde, ke oni intencas fari ion teruran al ĝi. Ĝi ekululis kaj fiksis siajn angorplenajn rigardojn al la kolonelo, sia severa estro, kiu tamen ne vidigis eĉ plej malgrandan kompaton. Kaj kiam el la malantaŭa muro de tiu stranga ejo eliris denove alia viro, tra pordeto, kiun Nukso pli frue ne rimarkis, ĉar ĝi entute ne estis rimarkebla, kaj kiam tiu viro alpaŝis strangan keston aŭ kaptilon, starantan sur tri piedoj, kiam malantaŭ la kesto li envolvis sin per nigra tuko kaj enigis la kapon preskaŭ en ĉi tiun keston kaj turnis kaj ŝraŭbis per diversaj iloj, ŝovis la tutan kaptilon pli proksimen al Nukso, kaj kiam li ekcelis al Nukso per elstaranta nigra tubo de tiu kaptilo kvazaŭ per kanono aŭ kuglopafilo — tiam glaciigis la tuta sango en la kompatindulo, ĝiaj membroj perdis kapablecon ekmovi sin. Nun — nun ekbruegos mortiga pafo kaj ĝia senkulpa sango elfluos ĉi tie. Kaj neniuekscios pri ĉi tiu murdo, eĉ ne ĝia iama estro en la stacio Chocẽ (aŭ eble Třebová). Nukso remomoris! — kaj se ĝi estus kapablinta plori, sangajn larmojn ĝi estus verŝinta. Ĝia estro! Ĉu li ne havis konfidencan scion pri ĉi tiu tuta komploto kontraŭ ĝi? Ĉu li ne ekkaptis ĝin per propraj manoj kaj ne ĵetis ĝin en tiun malbelan keston, kiu ĝin veturigis ĝis ĉi tien, en negasteman, nekonatan regionon, ĉu li ne elliveris ĝin al ĉi tiuj intriguloj?

Io ekkraketas malantaŭ la kesto aŭ en ĝi — certe oni ŝargas la kanonon! — Nukso fermetas la okulojn. Do nun! — Io klakas antaŭe. — Nukson atakas sveno, tamen ĝi vivas ankoraŭ. La viro, kiu tenas Nukson je la ŝnuro, turnas ĝin je la profilo, nova kraketo malantaŭe, nova eklako antaŭe, tamen Nukso ne renversiĝas. Ankoraŭ dufoje la sama manovro kaj poste la viro kun iaj skatoloj malaperis post la menciita pordo en la muro, nerimarkebla, dum ĝi ne estas malfermita. Kaj la viroj, kiuj partoprenis ĉi tiujn misterajn agojn ariĝas nun ĉirkaŭ Nukso, parolas nekompreneblajn vortojn, ridas. La sinjoro en uniformo klinis sin al ĝi, li eĉ karesis ĝin per mano. Li karesis ĝin! La unua kareso de post la momento, kiam ĝi estis forŝirita el sia ŝatata hejmo, kie ĝi vivis tiel kontente! Kareso per mola, varma, kompatema mano en momento, kiam pli eble ĝi atendis mortigan baton! Tia kareso efikis kvazaŭ saniga balzamo je ĝia ĝisnuna doloro. Kaj Nukso, por rekompenci lin, por danki ĉi tiun kompateman esprimon, faris ion, kion ĝi ne povis kuraĝi rilate la kolonelon, kion fari ĝi eĉ ne havis okazon. Ĝi eligis la langon kaj lekis dankeme la bonan manon de tiu kompatema viro. Ĝi lekis ĝin tiel arde, kiel ĝi faris kutime al sia estro, Matyáš Punčocha.

Poste ĉi tiuj homoj forkondukis Nukson el la fotografejo trans la urban placon en grandan

konstruaĵon, sur kies fronto etendiĝis dukapalada aglo, ili tiris ĝin en ian oficejon, alia viro kun grandaj okulvitroj skribis sur paperfoliegon, kion oni diktis al li, dum kio liaj vizaĝtraĵoj esprimis ĉiam pli da moko. Poste ĉiuj viroj subskribis la dokumentaĉon kaj fine tiu viro en civila vesto kun uzodifektita soldata ĉapo rekondukis Nukson en hejmon de la kolonelo, tamen ne plu supren en la ĉambron, eĉ ne en la antaŭĉambron, sed en la korton, en ian lignoprovizejon kaj tie en angulo Nukso ekrimarkis la malbonfaman kaĝon, en kiu oni veturigis ĝin ĉi tien. Antaŭ ol Nukso atentis ion, ĝi estis en la kaĝo, la krado super ĝi estis fiksita, poste okazis diversaj krakado, ŝancelado, brua veturo de malgranda veturileto sur pavino — kaj post ĉiu tiu bruo troviĝis Nukso kune kun la kesto en tute malluma ejo. Post nelonge ĝi eksentis, ke denove ĝi moviĝas — kaj ĉi tiun krakadon kaj bruadon ĝi konis jam bone. Nukso veturis! Kien ĝi veturas, ĝi ne sciis ankoraŭ.

IV.

Nukso veturu kien ajn, la veturo daŭros certe konsiderindan tempon. Dume ni rigardu, kion faras ĝia iama estro, Matyáš Punčocha.

Kiam Punčocha perdis sian Nukson, ekokupis lin malgajaj pensoj, ja eĉ senesperaj imagoj. Li estis maljuna fraŭlo kaj lia mastrumo en la dometo apud la stacidomo fariĝis ege dezerta post la foriro de Nukso. Kiam tagmeze manĝinte en gastejo li venis en sian loĝejon, por ripozi iom post la nokta kaj antaŭtagmeza deĵoro, li ne trovis la necesan ripozon en sia ĉambro. La nekutima kvieto ĉirkaŭ li pelis lin eksteren kaj, ĉar posttagmeze li ne estis deĵoronta, li iris en la urbon por dispeli siajn malgajajn pensojn. Li vagadis ĉiudirekten, sed la deziratan kvietigon li ne trovis. Pli frue dum tiaj promenoj akompanis lin Nukso, ĝi ĉirkaŭkuris lin, traplektadis sin inter liaj kruroj, bojetis, ludis postkurante aliajn hundojn — ho, kie nun estas Nukso?! Ĝis kien ĝi veturas?! En kiajn manojn ĝi venos?! — Kaj krom tio: ĉu el la afero fine tamen ne rezultos iu malagrablaĵo? Ĉu kontentiĝos la adresato pri Nukso, se li atendis tute alian beston? Tio ankaŭ malkvietigis Punčocha-n ĉiam pli multe. Ĉar ne

estas ĉiu hundo samvalora. Li, Matyáš Punčocha, ne estus doninta sian Nukson por ĉiuj hundoj en la mondo, ĉar tia hundo ne ekzistas plu. Kaj nepre li ne estus doninta ĝin por tiu infera bestaĉo, kiu malfeliĉ'okaze elsaltis el la kaĝo kvazaŭ diablo kaj poste malaperis, pli frue, ol li povis flegi, trinkigi kaj nutri ĝin en la rapidegtrajno. Tiu forkurinta hundaĉo nepre ne povas esti komparata kun lia Nukso. Kiu stultulo povis nur mendi ion similan?

Kaj tiaj pensoj turmentis Punčocha-n la tutan tempon ĝis vespere, kiam li estis revenanta el la urbo al la stacidomo.

Subite haltis Punčocha kaj malfermegis la okulojn. De kampoj al la urbo alproksimiĝadis ia hundo. Estis rimarkeble, ke ĝi estas lacegatiom, ke ĝi apenaŭ kapablas movi la piedojn. Punčocha ekvidis la hundon, kiu antaŭtagmeze forkuris el la kesto nur por momento, nur kiam ĝi saltis el la kaĝo kaj rapidege preterglitis lin, sed nun eĉ sekundon li ne dubis, ke li renkontas la saman hundon. Tio estas ĝi — la sama blanka korpo, la sama masko sur la vizaĝo, simetria sur ambaŭ flankoj, ĉar tiaj hundoj ne ekzistas en ĉi tiu regiono. Antaŭtagmeze ĝi forkuris rekte en la kampojn, kuradis la tutan tagon, verŝajne ĝi serĉegis eĉ nutraĵon kaj ne trovis ĝin, nun ĝi estas malsata, turmentita, lacega kaj pelata de instinkto ĝi revenas en la

urbon por trovi ie manĝopecon kaj noktripoz-ejon.

Punčocha kvazaŭ aŭtomate elpoŝigis pecon da ŝnureto, kiun li — kiel preskaŭ ĉiu fervojisto — ĉiam havis prete por hazardo, ĉar dum fervoja deĵoro oni devas ĉiam ion ripari, alligi, fortikigi. Kiam la hundo alproksimiĝis, Punčocha klakis per la lango kaj diris ŝajnigante bonkorecon:

„Venu ĉi tien — jen vi havas — prenul!“

Kaj per la alia mano li prezentis al la hundo pecon da krustiĝinta pano, kiu restis de la tagmanĝo al li.

La hundo hezitis iom. La nekonata homo estis suspekta al ĝi, kvankam male preskaŭ iom konata, sed la pano logis, ĉar ĝia stomako sopir-egis je manĝo.

Punčocha ripetis sian allogon per voĉo ĉiam pli flata, sed lia tuta korpo tremis jam pro malpacienco. Nur se la hundo alproksimiĝos je man'etendo! Kol'zonon ĝi havas. Kaj la kara Fokso — temis ja pri nia facilanima Fokso — venis pli kaj pli proksimen, kvankam singarde, atente — sed la malsato estas granda forto. Ankoraŭ unu paŝon — jen subita manetendo de Punčocha, rapida, preskaŭ raba ekpreno per la dekstra mano, kaj Punčocha kaptis kaj tenis per ĉiuj fingroj la kolzonon de la hundo kvazaŭ per feraj ungegoj. Fokso ankaŭ provis ekkapti la

maldekstran manon de Punĉocha, por ekmordi ĝin, sed samtempe per tiu maldekstra mano ĝi ricevis baton sur la nazon ĝis ĝi ekŝanceliĝis. Kaj jam estis traŝovita ŝnuro sub la kolzono, kelkfoje nodita — kaj Fokso estis kaptita. „Nudo, bestaĉo!“ ĝojekkriis Punĉocha. „Nun mi havas vin! La duan fojon vi ne forkuros. Vi servos anstataŭ Nukso. Kaj nur kiam ni venos hejmen, mi regalos vin per porcio da batoj por via matena friponaĵo. Ĉar via devo estis veturi, kiam estis pagite por vi, kaj ne forkuri, hundaĉo malbenita. Mi montros al vi, kian oficon vi havos!“

Fokso kontraŭstaris per ĉiuj kvar, sed baldaŭ ĝi ekkonis, kiom pli forta estas ĝia dresisto. Kaj fine instruis ĝin du- aŭ trifoja frapo per la fino de ŝnuro, ke preferinde estas obei ol kontraŭstari. Intertempe ĝi obeos do — sed tuj, kiam ĝi havos okazon, ĝi forkuros denove, sed tiufoje ien malproksimen.

Sed Punĉocha estis ankaŭ iom sperta pri la hunda psikologio kaj kvazaŭ legante la pensojn de Fokso li respondis:

„Ne opiniu nur, bestaĉo, ke vi denove forkuros! Nun mi estos atenta — kaj kredu al mi, ke por ĉiu malico vi ricevos merititan rekompencan. Vi spertos baldaŭ, kiu venkos!“

Spertis tion Fokso, sed spertis tion ankaŭ Matyáš Punĉocha. Ambaŭ ili spertis, ke ne ĉiu hundo taŭgas por ĉiu homo kaj inverse, precipe

se ili asociiĝas dum hazardaj kaj devigaj cirkonstancoj, kiel en nia okazo. Fokso havis eble kelkan bonan econ, sed Punĉocha ne sciis pri ĝi kaj ne kapablis uzi ĝin. Punĉocha povis eble esti bonega estro, sed Fokso ne sciis akomodiĝi al li. Kaj tiel de post la unua momento ili vivis en ia reciproka malfido, en malfacile kvietigata malamikeco, en „sieĝa stato“. En la naturo de Fokso ne estis eĉ iom da sindonemo de Nukso, de ĝia flatemio, de ĝia nepra obeemo. Ĝi estis ribelanto de neatendebaj intencoj kaj kapricoj, de maldecaj moroj.

Kaj Punĉocha de komenco ne povis senkulpigi ĝin, ke pro ĝi li perdis sian Nukson. Kia diferenco estas en la naturo de ambaŭ hundoj de Nukso kaj de tiu ĉi — aventurulo, kiun li ne kapablas eĉ voknomi. Li provis voki ĝin per ĉiuj nomoj, kiujn li aŭdis iam: Nero, Karo, Sultano, Lordo, Tigro, Pumo kaj per aliaj — Fokso aŭskultis kaj obeis je neniu. Punĉocha vokis ĝin do per la nomo Nukso, sed ĝuste tiuokaze montris la nova flegato evidentan indiferentemon kaj malobeemon, kvazaŭ ĝi sentus sin nepre ofendita per ĉi tiu nekonvena nomo.

La abismo de miskompreno kaj malamo plilarĝiĝis inter ili ambaŭ tagon post tago kaj Matyáš Punĉocha ekkonis amare, kiel li pekis kontraŭ sia kara Nukso elmetinte ĝin tiel senpripense kaj facilanime al nekonata, necerta

sorto. Turmentata de riproĉoj li ĉiam pli kaj pli profundigis en malamon kontraŭ Fokso, kion sentis ĉi tiu nedisciplinita, sed inteligenta hundo, kaj revengis sammaniere. Fine Punĉocha fariĝis melankolia kaj sidis kutime tutajn horojn rigardante sub la liton, sub kiu kuŝadis Fokso ĉiam atendante kaj flarante, kiel ĝi denove forkurus.

Punĉocha supozis sendube, ke li ne obeigos la fremdan hundon, ne subigos ĝin al sia volo kaj tamen li ne volis liberlasi kaj adiaŭi ĝin, ĉar li ĉiam esperis — — —

Jes, kion li esperis? Li mem ne sciis, kion. Subkonscie li havis ian nebulan imagon. Komence la imago estis tute neklara. Sed iom post iom la imago fariĝis pli klara kaj poste — poste iun tagon — respektive dum nokto, en sonĝo — aperis la afero antaŭ li kvazaŭ revelacio. Punĉocha, vekiĝinte el la sonĝo preskaŭ estus plorinta. Nome li sonĝis pri trajno, kiu bruegis tra la stacio Chocẽ (aŭ Třebová) kaj tiu trajno portis lian karan Nukson, sed ne en la sama direkto, kiel la unuan fojon, sed en la kontraŭa direkto! Ho, kion signifas ĉi tiu sonĝo? Kie estas Jozefo de Egiptujo, ke li klarigu al li ĝian signifon?!

Kaj ĝuste dekkvaran tagon, post kiam la senkompata sorto rabis lian Nukson de li, Punĉocha matene ekdeĵoris kvazaŭ duonkonscia kaj kalkulis tute mekanike la trajnojn, kiuj traveturis

la stacion, ŝarĝtrajnojn, miksitajn trajnojn, persontrajnojn. Nur kiam de malproksime ektondris rapidegtrajno, li rekonsciiĝis. Preterveturis rapidegtrajno el Vieno, dua el Vieno kaj ili ree malaperis malproksime. Sed nun proksimiĝis rapidegtrajno de Olomouc. Punĉocha sentis iun elektran tension en ĉiuj vejnoj, en ĉiuj nervoj. La trajno bruege enveturis, haltis kaj la trajnestro vokis al Punĉocha:

„Punĉocha, streĉu viajn krurojn! Post la tendro estas ia hundaĉo, ne forgesu trinkigi ĝin!“

Punĉocha salte alpaŝis la ŝarĝvagonon, Punĉocha malfermis ĝin, Punĉocha ekvidis en ĝi la konatan keston kun krado, Punĉocha tremante pro febro deŝiris la kradon, enrigardis la keston, ekkriis: „Nukso!“ — El la kesto saltis multkolora hundo kvazaŭ kvadrata — Nukso, lia Nukso! Punĉocha ekkaptis ĝin, premis ĝin al sia koro, per kelkaj saltoj li atingis sian dometon, ĵetis Nukson sur la liton, ekkaptis Fokson je la kolono sub la lito, per kelkaj saltoj li estis ree ĉe la vagono, ĵetis la malagrablan fremdulon en la keston, firme tenis ĝin, starigis ujon kun akvo al ĝi, frapfermis la kradon, fiksis la riglilon, fermis la pordon de la vagono. Ĉio tio okazis dum kelkaj momentoj. Kaj dum la rapidego kaj tumulto, kiu ekestas ĉiam, se alvenas rapidegtrajno, neniu rimarkis la agadon de Punĉocha. Feliĉ'okaze neniu! Post kvin minutoj forbruegis

la rapidegtrajno el la stacidomo, kaj neniuj supozis, ke en ĝi iu peco aŭ sendaĵo estis anstataŭita, subŝovita. Fokso veturis pluen al Praha kaj Punčocha kvazaŭ ebria pro ĝojo ŝanceliĝis al sia dometo por dediĉi almenaŭ momenton al sia perdita kaj denove trovita hundo, antaŭ kiam denove vokos lin la deĵoro. Li eĉ ne pensis pri tio, ĉu interŝanĝinte la hundojn li agis ĝuste aŭ malĝuste, same kiel li ne pensis pri tio antaŭ dekkvar tagoj. Kompreneble li ne havis eĉ imagon pri la korespondaĵo, kiun interŝanĝis la sendinto de Fokso kaj la akceptinto de Nukso, kaj kio ankoraŭ sekvis poste kaj kio ankoraŭ povas okazi. Li havis sian Nukson kaj tio sufiĉis al li. En lia animo denove heliĝis.

V.

Unu tagon pli frue, ol la „pola“ rapidegtrajno traveturis la stacion en Choceň (aŭ Třebová) ricevis dro. Topŭrko jenan telegramon de sia pola kliento:

„Hundaĉo ekspedita! Dezirataj fotografaĵoj kaj koncerna protokolo forsenditaj eksprese rekomendite. Objekto mem per plej proksima rapidegtrajno. Sciigu bestvendiston, laŭeble ĉe estu elliveron, konstati identecon laŭ fotografaĵo. Kolonelo Goljaŝ.“

Dro. Topŭrko prenis la advokatan taglibron kaj notis zorgeme al la morgaŭa dato:

„Goljaŝ kontraŭ Hornys: Iri al rapidegtrajno de Č. Třebová — konstati hundon.“

Kaj al la hodiaŭa dato li rimarkis:

„Goljaŝ kontraŭ Hornys: sciigi Hornys-on pri alveno de la hundo.“

Dro. Topŭrko decidiĝis, ke tiujn du vojojn li entreprenos mem, persone. Unue pro tio, ke la afero tre interesis lin, ĉar temis pri la unua tiuspeca proceso, due pro tio, ke temis pri „eksterlanda“ kliento kaj same pri la unua tia kliento. Se li bone priservos ĉi tiun klienton, estas eble, ke kolonelo Goljaŝ okaze rekomendos al li alian

klienton el siaj konatoj. Dro. Topŭrko estis tiurilate psikologo kaj sciis bone, ke iuj klientoj, kiuj venkis helpe de kiu ajn advokato, laŭdegas poste ĉi tiun sian advokaton kaj fariĝas preskaŭ pasiaj memvolaj liaj agentoj. Kaj ili estas feliĉaj, se ili povas iun el siaj amikoj kaj konatoj ekprocesigi, nur por povi pli poste konduki ilin al „sia“ advokato. Same kiel malsanuloj, kiujn resanigis iu kuracisto, kredas pli poste nur je arto de ĉi tiu kuracisto kaj serĉegas en sia plej proksima parencaro kaj en pli vasta rondo de siaj konatoj pluan malsanulan materialon al li.

Trie rezervis al si dro. Topŭrko „personan intervenon“, ĉar li ricevis konvenan antaŭpagon de la kolonelo. Li vidis en li viron, kiu dum sia „batalo pri rajto“ (laŭ prof. Ihering) ne cedos, eĉ se li devus elverŝi la lastan sangoguton, kaj tiajn klientojn — kompreneble — oni devas ŝati. Fine (kvare) li estus ja povinta sciigi sinjoron Hornys pri alveno de la hundo per letero, sed por tia letero oni povas kalkuli nur sensignifan bagatelon (precipe laŭ la nun valida subtilaĉa, nesimpatia tarifo, ke devas honti tiu, kiu oferis por siaj jurostudoj tutan duonon de sia vivo, ja eĉ la plej belan duonon!) — kontraŭe por persona vizito kaj tiel perdita tempo oni povas skribi en la advokatan fakturon sumon, kies la jura scienco kaj advokata praktiko estas inda. Krom tio necesas prudente paroli kun sinjoro

Hornys, ke li restu bonhumora. Ke li ne kontraŭstaru la akcepton de la hundo, se ĝia aspekto estus malboniĝinta dum la longa vojaĝo. Oni neniam povas antaŭdiveni — — Fine oni devas ekscii la precizan alvenon de la trajno, kaj interkonsenti pri kunveno kun sinjoro Hornys.

Sinjoro Hornys akceptis la refojan viziton de dro. Topŭrko konvene ĝentile, sed la sciigon pri la morgaŭa reveno de la vendita hundo li aŭskultis kun iom amara mieno.

„Nur ke tio estu mia hundo,“ li diris akre. „Kaj ke ĝine estu difektita.“

„Ho, pardonu,“ respondis dro. Topŭrko, „viro, kia estas sinjoro kolonelo Goljaŭ, certe scias trakti hundojn, kaj certe li traktis bone ankaŭ vian hundon, zorgeme provizis ĝin por la vojo kaj ne estas dubinde — —“

„Ĉu dubinde, ĉu ne dubinde,“ interrompis lakone Dagobert Hornys la doktoron. „Certe estas, ke tia kraketado sur fervojo prosperas al neniuj bestoj — des malpli dufoja kraketado dum dekkvar tagoj. Ankaŭ hundo havas nervojn — kaj neniuj scias, kio terurigos ĝin dumvoje. Tion oni devas kompreni.“

Dro. Topŭrko englutis ĉi tiun kaŝitan riproĉon, ke li ne havas fakajn sciojn pri hundoj, sed interne li decidiĝis, ke — post kiam Hornys reprenos la hundon — li laŭmerite rekompencos lian malĝentilecon; li enfakturigos tion bonege.

Pritraktinte ankoraŭ kun la birdovendisto la morgaŭan kunvenon en la stacidomo, li adiaŭis. — — —

Venis la morgaŭa tago kaj alproksimiĝis la tria horo, kiam estis bruege alvenonta la rapidegtrajno kun la procesa objekto.

Eble ankoraŭ al neniuj hundo estis iam preparata tia bonveno, kiel ĉi tiufoje al la kara Fokso, ĉar venis ne nur dro. Topŭrko kun sia advokata oficisto Leopold Vykysal, sed ankaŭ diplomita veterinaro Bonifac Oukok. Dro. Topŭrko invitis ĉi tiun fakulon, por ke li konstatu la sanstaton de la atendata hundo. Venis ankaŭ sinjoro Hornys, kaj siaflanke li kunvenigis la dommastron Kobylka, parte kiel helpanton, parte kiel atestanton, ĉar Kobylka estis ofte lia helpanto kaj sciis jam tiom pri la aferoj de sinjoro Hornys, ke en fako de malgrandaj bestoj oni povis konsideri lin fakulo. Sen skrupuloj oni povis nomi lin juĝa eksperto, ĉar laŭsperte oni scias, ke por fariĝi „juĝa eksperto“ oni ofte bezonas nepre neniajn spertojn. Sed nepre estu ĉi tie menciite, ke Vilibald Kobylka „persone“ konis Fokson, pri kiu ĝuste temis. Kaj krom ĉi tiuj kvin personoj staris ĉi tie ankoraŭ publika servisto, kiun invitis dro. Topŭrko en lasta momento antaŭ la stacidomo, pro iu inspiro, se oni bezonus brutalan, nerezisteblan forton por perforti petoleman kaj neobeeman beston. Li

mem ne povas ja lukti kun hundo de nekonata naturo!

Tio estis respektinda sesmembra „deputacio“, kiu atendis la revenon de la intertempa ekzilito. Mankis nur festa oratoro kaj belegaj florbukedoj. Sed oni scias, ke hundoj eĉ de plej noblaj rasoj ne havas senton por floroj.

Sur perono svarmis amaso da homoj atendantaj alvenon de amikoj, parencoj, familianoj, kareguloj. Sed certe neniuj el ili ardis pro senpacienco tiom, kiom dro. Topŭrko. Li estis maltrankvila, de tempo al tempo li ekhaltis por paroli kelkajn vortojn kun la veterinaro, kaj denove li promenis sur perono. De tempo al tempo li ekpalpis la maldekstran surbrustan poŝon, en kiu estis kaŝita lia ĉefa atuto. Nome frumatene enmanigis la poŝto al li ekspresan sendaĵon el Polujo, la fotografaĵojn de la kompatinda Nukso kaj la juĝan protokolon pri fotografado kaj pri identeco de la hundo. En la protokolo kompreneble Nukso ne povis esti nomata, ĝi estis tie indikita sole per mencio „la disputata hundo“, kaj en la plua daŭrigo tute koncize „la koncerna hundo“. Per tiu grava dokumento dro. Topŭrko ankoraŭ ne fanfaronis, la fotografaĵojn li ne montris. Pri ĉi tiuj dokumentoj sinjoro Hornys ne havu eĉ ideon. Venos ja konvena momento!

Dro. Topŭrko eĉ ne supozis, kiel proksima estas jam ĉi tiu „konvena momento“.

Subite pleniĝis la tegmentita stacidoma halo per dekobla fonda eĥo, sub la tegmenton enveturis rapidegtrajno, en kies feraj pulmoj bruegis la lastaj spiregoj. Dro. Topŭrko treege ekscitiĝis. Li vidis nenion alian nur la ŝarĝvagonon kaj li ne povis ĝisatendi la momenton, kiam la perono malpleniĝos. — Male sinjoro Hornys staris laŭŝajne trankvile kelkajn paŝojn de la doktoro, rigardante samdirekten. Sed, se oni estus pli atente observinta sinjoron Hornys, oni estus diveninta, ke li estas ne malpli ekscitita. Liaj buŝanguloj moviĝis kvazaŭ skuataj de elektra fluo kaj la fingropintoj de ambaŭ manoj tremis.

Fine oni malfermis la ŝarĝvagonon (la atendanta deputacio nur pene detenis sin ne enrampi ĝin), fine oni eliris la hundokaĝon, levis ĝian kradon. Unuflanke staris kun antaŭstreĉitaj manoj Vilibald Kobylka, aliflanke la publika servisto, ambaŭ pretaj, ekkapti la hundon kaj ligi la ŝnuron sur ĝian kol'zonon.

Sed ĉi tiun fojon Fokso ne saltis el la kaĝo kvazaŭ diablo, kiel ĝi faris en la stacidomo antaŭ dekkvar tagoj. Sendube ĝi memoris ĉion, kio okazis post ĝia forkuro en Choceň (aŭ Třebová) kaj ĝi verŝajne ne deziris, ke la tuta okazaĵo ripetiĝu. Kia mirinda hunda inteligenteco! Kian instruon ĝi ĉerpis el sia malagrabra sperto. Ĉi tiun fojon oni devis preskaŭ perforte tiri ĝin el la kesto, kaj kiam estis ligitaj al lia kol'zono

ŝnuroj - unu de Kobylka, la alia de la servisto - unue ĝi proksimume dekfoje cirkle turniĝis kun malfermita buŝego, kvazaŭ ĝi volus ekkapti sian voston. Kobylka konkludis, ke turniĝas ankoraŭ ĝia kapo pro la longa vojaĝo.

„Fokso!“ vokis modere, duonvoĉe sinjoro Hornys intence kaŝante sin post la aliaj, por provi, ĉu la hundo ekkonos la voĉon de sia iama estro.

Fokso levis la nazon, starigis la orelojn, flaris. De kie eksonis ĉi tiu konata voĉo? Ĝia hunda vizaĝo esprimis ĉi tiun demandon.

„Fokso!“ ekvokis sinjoro Hornys la duan fojon, nun iom pli laŭte.

Fokso ekbojis, ŝiris sin el la manoj de ambaŭ viroj, kiuj tenis ĝin, liberigis al si la vojon inter la kruroj de la ceteraj kaj jam ĝi suprensaltis al sinjoro Hornys, de sur kies kapo ĝi preskaŭ estus deĵetinta la ĉapelon.

„Fi, Fokso, neniajn petolaĵojn!“ admonis ĝin la estro, kaj turnante sin al dro. Topŭrko li diris malrespekte: „Sed nun mi ŝatus ekscii, kiajn okulojn havas sinjoro kolonelo Goljaŭ kaj kie li havas ilin, ke li povis skribi al mi pri ĉi tiu hundo tion, kion li skribis! Ĉi tiun hundon li ricevis, ĉi tiun hundon li redonas — li havis, kion li postulis, kaj tiel li malbonfamigis ĝin kaj al tio ĉio li prenas ankoraŭ advokaton! Nu, se iu komprenas tion — mi ne komprenas ĝin! Ekzistas ankoraŭ en la mondo stultuloj!“

Dro. Topŭrko kvazaŭ senintence lasis neaŭdita la ofendan aludon pri la kolonelo Goljaŭ, ĉiun lian atenton, se ne ĉiujn liajn sentojn, kaptis la eksteraĵo de la hundo ĉirkaŭsaltanta sian estron. Li rigardis ĝin kun larĝe malfermitaj okuloj kaj ekvokis:

„Sed tio ne estas la ĝusta hundo!“

„Tio estas la ĝusta hundo!“ kontraŭdiris sinjoro Hornys.

„Mi ripetas, tio ne estas la ĝusta hundo!“ replikis dro. Topŭrko. „Mi atendas tute alian hundon!“

„Mi ne scias, kian hundon vi atendas“, respondis ironie sinjoro Hornys, „mi atendis ĉi tiun kaj tiu venis! Ne povis ja veni alia, ĉar mi ne sendis alian. Kompreneble — en bonaj manoj, laŭŝajne, ĝi ne estis. Ĝi estas malpura kiel maŭso sur sojlo kaj malgrasiĝinta ĝi estas, kompatindulo! Tia ĝi ne foriris el miaj manoj“.

Dro. Topŭrko malfermis subite sian jakon, mirinde, ke la butonoj ne forŝiriĝis, li elpoŝigis koverton, el la koverto li eltiris kelkajn fotograf-aĵojn. Liaj manoj tremis, kiam li prezentis duonon de la fotograf-aĵoj al la veterinaro Oŭrok kaj tute ekscitite li vokis:

„Bonvolu, sinjoro veterinaro! Ĉu tio estas la sama hundo, ĉu ne . . .“

La veterinaro nur fluge rigardis la fotograf-aĵon kaj diris:

„Nu, tio estas evidenta, ke tio ne estas la sama hundo. Tio estas tute alia „raso“.

Sinjoro Hornys ekrigardis la fotograf-aĵojn trans ŝultron de la veterinaro, elkraĉis malrespekte kaj eksplodis per venenplena rido:

„Tio estas entute nenio raso! Estas hontinde nomi tian beston hundo. Tia hundon devus ĉiuj hundoj akuzi pro ofendo de la hunda raso. Tio estas tia vilaĝa degeneraĵo — da kiuj oni povas ricevi kvin por unu krejnero.“

Dro. Topŭrko paliĝis post la vortoj de sinjoro Hornys kvazaŭ kadavro. Ĉiun vorton, kiun elparolis la zoologo, li konsideris ofendo de sia kliento. En la fasko de dokumentoj li havis „species facti“ unue de la majoro kaj poste tute detalajn de la kolonelo, ambaŭ ilin li konsideris nepre veraj. Li havis tutan albumon da fotograf-aĵoj de Nukso, li havis nomaron de personoj, kiuj estis atestantoj dum la fotografado, kaj prave li konsideris la fotograf-aĵojn ĉiurilate ĝustajn. Fine li havis juĝan protokolon pri identeco de la hundo, prezentita de la kolonelo Goljaŭ, kaj se estas en la mondo io sankta, do certe tio estas juĝa protokolo!

Momenton li silentis, por ne tro fervoriĝi. Poste li alpaŝis sinjoron Hornys dirante al li per vortoj mordantaj kvazaŭ fortakvo:

„Kaj tiun hundon, pri kiu vi ĵus parolis tiel malŝate, vi sendis al sinjoro kolonelo, kaj sinjoro

kolonelo resendis la saman hundon al vi. Kiel okazis, ke anstataŭ ĝi venas hundo tute alia, mi ne povas ankoraŭ klarigi, sed unu cirkonstanco estas al mi nedubinde klara, ke kun vi oni ne povas pace ordigi la disputatan aferon. Mi sciigas vin, ke en nomo de mia kliento mi senprokraste ekprocesos pri kompenso de la tuta damaĝo, kiun ĉi tiu frivola negoco rezultigis al sinjoro kolonelo.“

Li finparolis kaj akompanata de la veterinaro kaj de sia oficisto li foriris el la stacidomo. — —

Mi supozas, ke ne ekzistas leganto, kiu ne divenus, ke post ĉi tiu okazaĵo ankaŭ sinjoro Hornys prenis advokaton al si. Sed apenaŭ ekzistas leganto, eĉ se li havus plej grandajn spertojn en procesaferoj, kiu povus imagi, kia proceso ekestis post reveno de Fokso kaj post kiam prezentis dro. Topŭrko sian juĝan plendon kaj la advokato de sinjoro Hornys la kontraŭplendon. Ekestis proceso, kies aktaro en polvoplana juĝa registrejo faras faskon pezantan preskaŭ kvaronon da centkilogramo. La tuta afero estis klara nek al ekspertoj, nek al veterinaroj, nek al atestantoj kaj, kiam dro. Topŭrko prezentis al la juĝa tribunalo la fotografiaĵojn de la kompatinda Nukso kaj kiam sinjoro Dagobert Hornys prezentis al la juĝa tribunalo sian Fokson, kiu intertempe jam satiĝis kaj refortiĝis, kaj kiam li ĵuris, ke tio estas la hundo, kiun li sendis al Polujo kaj

kui revenis el Polujo, kiam li pruvis tion eĉ per atesto de Vilibald Kobylka kaj kiam pruvis tion ankaŭ sinjoro majoro Votruba — la afero ne estis klara eĉ al la juĝa tribunalo.

Sed la juĝisto, kiu gvidis la proceson pri Fokso-Nukso, estis viro treege justa kaj iugrade ankaŭ ambicia kaj en la mallumo de tiu problemo ekbrilis al li iun tagon fajrero de espero. Kio okazus, se li demandus la fervojan administracion pri la maniero kaj procedo, laŭ kiu oni ekspedas hundojn? Kaj ĉi tiuj esploroj gvidis lin ĝis la trinkiga stacio Choceň (aŭ Třebová) kaj li postulis, ke oni esplordemandu la trinkigiston de hundoj, Matyášon Punčocha-n.

Sed Matyáš Punčocha kondukis tute konsekvence kaj faris en la afero ĉion, kion li nur povis fari en intereso de sia ekzistado — kuraĝe li malkonfesis ĉion. Li konsciis, kio minacus lin, se li konfesus sian agadon: administraj esploroj, perdo de la okupo, malsato ĝis la morto. Matyáš Punčocha ne estis tiom malsaĝa, ke li konfesu.

Poste do, ĉar ĉiu proceso devas finiĝi per iu verdikto, okazis tiel ankaŭ en ĉi tiu okazo.

La juĝa tribunalo verdiktis laŭjure, ke Fokso estas efektive Fokso, ke sinjoro Hornys liveris precize laŭ la mendo, la plendo de dro. Topŭrko estis rifuzita kaj lia kliento estis kondamnita kompensi al sinjoro Hornys la damaĝon, kiu re-

zultis al li — „pro restarigo de la sanŝtato kaj anima ekvilibro malboniĝintaj ĉe la procesa hundo nomata Fokso, pro la dufoja longa kaj ekscitanta vojaĝo, per nesufiĉa flegado, eventuale per nekonstatita alia malbona traktado, kiu povas esti konkludata laŭ la deklaroj de du juĝaj ekspertoj pri hundoj, kaj ankaŭ de invitita veterinaro Makario Kozlík“ — kaj memkompreneble la kliento de dro. Topŭrko, la kolonelo Goljaŝ, estis kondamnita ankaŭ kompensi ĉiujn proceskostojn. For estis la banknoto sendita antaŭpage por la hundo, for estis la antaŭpago de la kolonelo por proceskostoj kaj for estis ankoraŭ kelkaj pluaj banknotoj.

Kiam dro. Topŭrko sendis al la kolonelo Goljaŝ la resuman fakturon kaj kiam li ricevis de li la restpagon de la proceskostoj, elfalis el la banknotpaketo slipeto, sur kiu estis notite per karakteriza skribo de Goljaŝ:

„Saluton, sinjoro doktoro! Venonte mi petos ree viajn servojn!!! Goljaŝ.“

La manoj de dro. Topŭrko senforte malleviĝis, la slipeto falis el ili. Ĉi tiu mordanta ironio de la kolonelo estis pli efika ol veneno. Li faris ja, kion li povis, kapablis, rajtis.

*

La afero estis finita por ĉiuj partoprenintoj, sole dro. Topŭrko ne kuraĝis meti la faskon pri

Goljaŝ al „kadavroj“, kiuj eterne dormas en ĉiu advokata registrejo. Al li fariĝis la Foks'okazaĵo preskaŭ fiksa ideo. Kun plezuro li oferus sian tutan profiton, kiun rezultigis la proceso al li, ja volonte li pagus mem ĉiujn elspezojn, se li povus akiri satisfakton; se li povus konvinki la kolonelon, ke la proceso estis perdita ne pro lia kulpo, sed pro amasiĝo de hazardaj, misteraj kaj neesploreblaj cirkonstancoj.

Tiucele daŭrigis dro. Topŭrko ĉiaman, sed sekretan interilaton kun kelkaj fervojaj faktoroj nepre esperante, ke fine tamen falos la vualo, kovranta neklaran momenton en la vivo de Fokso kaj en la vivo de alia, nekonata kaj netrovebla hundo.

Kaj ĉi tiu espero ne trompis dron. Topŭrko. Dasis kelkaj monatoj kaj post ĉi tiuj monatoj oni solenis en Choceň (aŭ Třebová) kermeson kaj precipe solenis ĝin Matyáš Punčocha, kiu venis kun sia fidela Nukso, kaj sidiĝis ĝin sur benkon apud si.

La gastoj plimultiĝadis kaj fine iu malfrue veninta gastu, kiu ne povis trovi sidlokon kaj vidis, kiel komforte sidas Nukso apud sia estro, diris malrespekto, ke hundo apartenas sub benkon kaj ne sur ĝin.

Punčocha, kiu ĉi tiun tagon trinkis jam iom super la mezuron, ekkriis ekscitite:

„Nu, kamarado, ĝin vi devas respekti! Ĝi estis

pli malproksime en la mondo, ol ni ĉiuj. Ĝi estis ĝis en Polujo kaj servis tie ĉe kolonelo, kiu pro ĝi elspezis tiom da mono, ke por ĝia sumo oni povus aĉeti paron da ĉevaloj!“

Vorto sekvis vorton kaj Punĉocha, kies langon senlime paroligis la kermesa humoro, rakontis la tutan okazaĵon, kiel li dufoje interŝanĝis Nukson.

Kompreneble pli malbonhumora estis Punĉocha la alian tagon matene, kiam venigis lin la staciestro, al kiu tuj oni rakontis la senintencan konfeson de Punĉocha. Post vanaj provoj mensogi, konfesis fine Punĉocha la tutan aferon ankaŭ al la staciestro. Kaj la staciestro sendis senprokraste raporton al Praha, la fervoja administracio sciigis la juĝiston, al kiu antaŭ monatoj ĝi respondis negative, la juĝisto sciigis dron. Topŭrko — kaj tiam travivis dro. Topŭrko la plej feliĉan tagon de sia vivo. Li estis rehonorigita!

Senprokraste li postulis kopion de la koncernaj dokumentoj, sendis ilin kun priskribo de la nun klarigita okazaĵo al kolonelo Goljat kaj je la fino li aldonis:

„Mi petas respondon, ĉu mi ekprocesu denove pro la konfeso de Punĉocha. Kompreneble mi ne rajtas kaŝi, ke li eble povus perdi sian postenon kaj tial mi rekomendas pardonon lin. Mi supozas, ke li estas sufiĉe punita per timo, en kiu li dronas jam dum tuta semajno. Fine mi

petas sciigon, ĉu vi deziras ankoraŭ Foksterieron. Sinjoro Hornys havas freŝan provizon, tri ekzemplerojn malkvietajn kvazaŭ hidrargo.“

Poŝtrevene respondis la kolonelo Goljat:

„Kara doktoro, neniun novan proceson! La unua kostis min sufiĉe da kolero kaj mono, tamen post via sciigo mi ne bedaŭras tion. Dum mia tuta vivo nenio amuzis min pli, ol ĉi tiu artifiko de Punĉocha. — Li estas viglulo kaj faris tion tre bone. En nia klubo oni ne povis satridi kaj dum la vivo mi ne forgesos Fokson-Nukson. Tamen novan Foksterieron ne sendu plu. La duan fojon mi eble povus ricevi katon. Mi intencas veturi al Praha kaj poste mi kunprenos mem ian taŭgan Fokson. Mi devas ja ankaŭ interpaciĝi kun tiu malbenita Dagobert Hornys. Via kolonelo Goljat.“

KELKAJ KLARIGOJ KAJ KOREKTOJ.

Al vilaĝaj hundoj — kutime senrasaj bastardaĉoj oni tre ŝatas doni la nomon „Vořech, Voříšek“, kiu esperantigita signifas: „Nukso, Nukseto“. Male „Foksteriero“ (mallongigite „Fokso“) estas angla, purrasa, ne tro granda, svelta kaj tre vigla hundo de blanka koloro kun brunaj aŭ nigraj makulegoj sur la vizaĝo.

Kolín, Pardubice, Chocẽ, Česká Třebová, Olomouc estas urboj situantaj apud la fervojlinio eliranta orienten de la iama ŝtata ŝtacidomo (nun la Masaryk-ŝtacidomo) en Praha.

Řevnice estas ŝatata somerrestadejo de Prahaanoj, situanta sudokcidente de Praha sur la fervojlinio Praha—Beroun.

Kiam la rakonto estis verkata, apartenis Bohemio kaj la suda parto de la nuna Polujo al Aŭstrio, kies ŝtata blazono enhavis dukapan aglon. Per ĉi tiu blazono estis signifitaj ĉiuj ŝtataj oficejoj, juĝejoj ktp.

Sur p. 12 l. 4 m. legu anst. pensitan — pensian


„ „ 23 „ 10 „ „ „	raso — rasa
„ „ 34 „ 1 „ „ „	pritratos — pritraktos
„ „ 42 „ 4-5 s. „ „	ensprimis — esprimis
„ „ 42 „ 6 m „ „	pavino — pavimo
„ „ 55 „ 1 s. „ „	povas — povos


Ĉe la eldonejo de „Moraviaj Esperanto Pioniroj“ en Olomouc, Riegrova 17, RĈS. estas haveblaj ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de jenaj eldonaĵoj: J. Welzl, Tridek jarojn en la ora nordo, bind. 38 Kĉ. J. Herben, Malriĉa knabo, kiu gloriĝis, broŝ. 16 Kĉ.

Ĉiuj ceteraj eldonaĵoj de M. E. P. estas jam elĉerpitaj, sole de la fretjura verko: „Internaciaj konvencioj pri fervojaj person-, pakaj- kaj fretajtrafikoj“ posedas ankoraŭ kelke da vendeblaj ekzempleroj U. E. A. en Ĝenevo.

Mendante sendu la monon kaj aldonu 10% por afranko!







Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678466

